## Kiel s-ro USIKUBO fariĝis go-profesiulo? {Sekvo}

Kiam mi estas en la 6a jaro de elemanta lernejo {11 aŭ 12 jaraĝa}, laŭ la vortoj de instruisto KARIYA Kei ｛刈谷 啓｝, profesiula 9 DANNulo, oni tuj decidis ke mi fariĝas profesiul-kandidato de KANSAJa Go-Instituto. Tiame, ĉefdirektoro de NIHON {Japana} Go-Instituto estis s-ro ARIMITU Zirou {有光 次郎}, kiu devenis de KOUTI gubernio, mia hejmloko. Estis negoco, ke ili konfidis min al NIHON {Japana} Go-Instituto, kun tiama Deputito SIOMI Syunzi {塩見 俊二} (posta Ministro por Publika Bono). Tamen mia patro ne sciis tiajn cirkonstancojn {, kaj preferis KANSAJan Go-Instituton}. Li nur fidis la instruiston KARIYA kaj pensis, ke pli bone estas proksima KANSAJ.

Mi estis iel konvinkita, ke mi fariĝos disĉiplo de la instruiston KARIYA, tamen li ne akceptis disĉiplon. Tiame elektitaj kandidatoj kolektiĝis en skoloj de fortaj profesiuloj HASIMOTO Utarou {橋本 宇太郎} kaj SEKIYAMA Riiti {関山 利一}, sed mi ne havis rilaton al ili. Mi ne havis majstron ĝis la 2a jaro de mezlernejo {13 aŭ 14 jaraĝa}, ĉi tiam, mi malfrue disĉipliĝas al profesiulo KUBOUTI Syuuti {窪内 秀知}.

S-ro KUBOUTI tiam fote intencis kreski disĉiplojn. Lia patrino devenis de KOUTI, kaj havis intereson al mi, sed li pensis ke mi estas disĉiplo de s-ro KARIYA.

Kiam mi estis profesiul-kandidato, postludadis ludojn de HON-IN-BOU {本因坊} Syuusaku ｛秀策｝ kaj Syuuei {秀栄}, malgraŭ ke komprenis ne bone. Ili ludadis sen ‘egaligaj poentoj’ {japane KOMI} laŭ tradicia kutimo. Tiam ĉefa celo por lertiĝi estis ‘Nepre venki ludante nigron.’ Kontraŭ tio, unuaklasaj profesiluoj devis esti rimedriĉaj ludante blankon. En ĉi tiu senco, idealaj estis Syuusaku ludanta nigron kaj Syuuei ludanta blankon, ankaŭ por profesiul-kandidatoj ili estis bonegaj modeloj. Iom ajn multafoje postludis iliajn ludojn, ne povis kompreni. (Nebule ekkomprenis post kiam fariĝis 7a DANNulo.)

Tiam mi adoris ludomanieron de GO Seigen {呉 清源}. GO-profesiuloj ordinare ne scias kiel esprimi pri GOo en vortoj, malgraŭ ke ili sentas la esencon de GOo. Pri ludoj de GO Seigen, interpretisto YASUNAGA Hazime {安永 一} eksplikis teorie, do mi povis kompreni bone. El profesiulaj Goistoj, eble nur NOZAWA Tikutyou {野沢 竹朝} en TAISYOU {大正} erao ｛precize en jaro 1915｝ sur lia artikolo “Recenzo pri recenzo” penis klarigi GOajn ŝtonmetojn teorie. Mi sentis ion komunan en la klarigo de YASUNAGA kun tio de NOZAWA.

Mi DANNuliĝis en jaro 1963 (je 16 jaraĝa). Post 14 jaroj promociiĝis al 9a DANNulo. La 9a DANNo estas la plej alta, sed mi estis nur la lasta membro el multe da 9aj DANNuloj. La promocio estis nur la rezulto de deformita sistemo por promociigo, kaj mia arto tute ne estis la plej alta. Kvazaŭ veturis sur ŝtupar-lifto, sur kiu mi estas metita kiam mi estis infano.